UNUA DIMANĈO POST KRISTNASKO - 27a de decembro 2009

JESUO ESTAS RETROVITA DE LA GEPATROJ EN LA TEMPLO MEZE DE LA INSTRUISTOJ – Komentario al la Evangelio de p.Alberto Maggi OSM

Lk. 2, 41-52

Liaj gepatroj iris ĉiujare al Jerusalem ĉe la Paska festo. Kaj kiam li estis dekdujara, ili supreniris laŭ la kutimo de la festo; kaj kiam ili jam pasigis la tagojn, ĉe ilia returniĝo la knabo Jesuo restis en Jerusalem, kaj liaj gepatroj tion ne sciis; sed supozante, ke li estas en la karavano, ili iris tagan vojaĝon, kaj serĉis lin inter siaj parencoj kaj konatoj; kaj ne trovinte lin, ili reiris al Jerusalem, serĉante lin.

Kaj post tri tagoj ili trovis lin en la templo, kie li sidis meze de la instruistoj, aŭskultante ilin kaj metante al ili demandojn; kaj ĉiuj, kiuj aŭdis lin, miregis pro lia kompreno kaj liaj respondoj.

Kaj ili miris, vidante lin, kaj lia patrino diris al li: Filo, kial vi tiel agis kontraŭ ni? jen via patro kaj mi serĉis vin kun malĝojo. Kaj li diris al ili: Kial vi serĉis min? ĉu vi ne sciis, ke mi devas esti en la domo de mia Patro? Kaj ili ne komprenis la diron, kiun li parolis al ili.

Kaj li malsupreniris kun ili, kaj venis en Nazareton, kaj li estis obeema al ili; kaj lia patrino konservis ĉiujn tiujn dirojn en sia koro. Kaj Jesuo progresis en saĝeco kaj staturo, kaj en graco ĉe Dio kaj homoj

Por la festo de la Sankta Familio la Eklezio nin prezentas tekston el la Evangelio laŭ Sankta Luko, kie, unuavide, tiu ĉi śajnas nekonsekvenca familio pli ol Sankta Familio. La gepatroj kiuj ne ekvidas ke ilia filo ne estas kun ili, la filo kiu restas en Jerusalemo sen averti, sen sciigi tion al la gepatroj, temas pri reciproka riproĉo.

Tiam ni klopodu ekvidi kion vere la Evangeliisto intencas diri al ni per tiu evangelia peco. Kaj, kiel ĉiam ni devas rememori tion, ke la Evangelioj ne estas kronikoj, sed ili estas teologiaj verkoj, ke en la Evangelioj ne troviĝas aro da eventoj, sed en ili troviĝas veraĵoj kiujn la Evangeliisto deziras prezenti al la kristana komunumo. Ĉar la Evangelioj ne rilatas la historion sed ili rilatas la fidon. Jen kial tiu ĉi evangelia peco povas ion diri ankaŭ al la nuntempaj kredantoj.

La Evangelio estas tiu laŭ Sankta Luko, ĉe la 2a ĉapitro, ekde la versego 42a. Skribas la evangeliisto: “Liaj gepatroj”. Jen la evangeliisto jam donas al ni unuan indikon: en tiu ĉi peco la gepatroj neniam estas nomataj per siaj propraj nomoj, Maria kaj Jozefo, sed ili ĉiam estas nomataj “gepatroj” aŭ “patro” aŭ “patrino”.

Unu el la teknikaĵoj de la evangeliistoj estas tiu; kiam ili volas prezenti al ni rolanton kiel reprezentanton de iu realaĵo, ili evitas enmeti lian nomon, ili lin prezentas anonime. Do anonima persono reprezentas iun realaĵon.

Nu, la evangeliisto, forvišante la nomojn de la gepatroj de Jesuo, pere de ili li volas simboli la nekontentecon de Izraelo kiu ne rekonas en Jesuo la atenditan Mesion, Li estas Mesio kiu kondutas alimaniere ol ili atendis de Li.

“Liaj gepatroj iris ĉiujare al Jerusalem ĉe la Paska festo”, kaj ĉifoje, skribas Sankta Luko, kiam li estis dekdujara ili kunportis kun si ankaŭ Lin “laŭ la kutimo de la festo”. Fakte la devigo komenciĝis de la dektria jaro, sed tie ĉi videblas ke temas pri familio fidela al la leĝoj kaj ilin observanta kaj ili eĉ kunportas kun si la filon unu jaron antaŭe.

Dum tiu ĉi Paska festo oni loĝis tie dum unu semajno, sed sufiĉis eĉ tritaga restado. “Kaj kiam ili jam pasigis la tagojn, ĉe ilia returniĝo la knabo Jesuo restis en Jerusalem, kaj liaj gepatroj tion ne sciis”. Kion intencas diri la evangeliisto per tiu stranga epizodo? Kial Jesuo ne sciigis la gepatrojn, kaj, ĉefe kiel do, la gepatroj ne tion rimarkis?

La klarigoj kiujn oni donis en la pasinteco estis infanecaj; oni malvere opiniis ke ekzistis du karavanoj, unu rezervita nur al viroj kaj unu rezervita nur al virinoj. Do, Jozefo, kiu troviĝis en la karavano de la viroj, pensis: “nu li estas ankoraŭ etulo, li restis kun la panjo”, kaj la patrino, ne vidinte la filon, versxajne pensis: “nu, li jam estas granduleto, li estas kun la patro”. Tiuj estas banalaj kaj infanecaj klarigoj.

La evangeliisto volas prezenti al ni ion pli serioza. Jesuo ne sekvas la gepatrojn, sed estas la gepatroj kiuj devos sekvi Jesuon. Jesuo estas la novaĵo, jam en la anonco de la anĝelo al Zeĥarja (1, 17) oni diris al li ke Sankta Johano la Baptisto devas turni la korojn de la patroj al la infanoj – la koro estas la menso- kaj li ne devas turni la korojn de la infanoj al la patroj. Estas la malnoveco kiu devas akcepti kaj kompreni la novecon.

Do Jesuo restis en Jerusalemo. Ili tion komprenas post unu tago da vojaĝado, ili revenas al Jerusalemo kaj lin trovas post jam tri tagoj; tio signifas ke ili serĉis lin ie ajn, krom en la ununura loko kie ili devis lin serĉi, “kaj ili trovas lin en la templo, kie li sidas meze de la instruistoj”. Kial la evangeliisto uzas tiun ĉi esprimon “meze de”?

En la libro de Ŝiraĥ, ĉe la ĉapitro 24a versego 1a, “meze” estas la loko de la saĝeco: ”La Saĝeco komencas laŭdi sin mem kaj meze de sia popolo Ŝi sin gloros”. Do, la evangeliisto vidas Jesuon kiel bildigon de la dia saĝeco. Li sidas meze de la instruistoj de la templo, kaj li ilin aŭskultas kaj pleje li metas al ili demandojn sen atendi ilian respondon. Sankta Luko diras al ni: “Kaj ĉiuj, kiuj aŭdis lin estis eksterr si”, tiu estas la laŭlitera dirmaniero uzata de la evangeliisto, ili miregis.

Tiu estas negativa mirego, tiom tio ĉi veras ke venontfoje kiam Jesuo revenos al la templo, tiuj instruistoj pri la leĝo sin turnos malafable al li por lin mortigi. “Kaj ili miris, vidante lin”, kiel okazis ankaŭ al lia patrino kiu diras al li: “Filo - laŭlitere la esprimo uzata de la evangeliisto estas “Filo mia” aŭ “knabo”- uzante grekan terminon kiu indikas “tiun kiu estas naskita”, nome iun sur kiu la patrino havas rajtojn, povojn; kaj jen ĉi tie la unua fuŝo de Maria.

Ŝi opinias havi rajtojn sur Jesuo. Mi tion rediras, la evangeliisto ne prezentas konkrete al ni Marian, sed li prezentas al ni la patrinon, la originon de Jesuo. Estas la izraela popolo, bildigita en la patrino, kiu sin turnas al la filo opiniante havi rajtojn kaj povojn. “Kial vi tiel agis kontraŭ ni?”

Jen la dua fuŝo de la patrino, “Jen via patro kaj mi serĉis vin kun malĝojo”. Kaj jen la respondo de Jesuo, el historia vidpunkto povas ŝajni strange ke la unuan fojon en la Evangelio kiam Jesuo sin turnas al sia patrino li tion faras per akraj riproĉvortoj, “Kaj li diris al ili: Kial vi serĉis min?”

Do, Jesuo protestas, ili ne devis Lin serĉi, kaj poste jen ke Jesuo klarigas, li plendifinas ĉion: “Ĉu vi ne sciis”, do Li traktas ilin kiel sensciulojn, tiu estis afero kiun ili devis scii., “ke mi devas”. – La

verbo “devi” estas teknika verbo uzata de la evangeliistoj por indiki la plenumon de la dia volo -“mi devas esti en la domo de mia Patro?”.

La patrino eraris kiam ŝi diris: “Jen via patro kaj mi serĉis vin kun malĝojo.”, kaj Jesuo tuj klarigas ĉion. Lia patro ne estas la edzo de Maria, ne estas Jozefo, Lia patro estas la Patro kiu estas en la ĉielo, kaj estas tie ke Jesuo devas esti, Li devas sin okupi pri la aferoj de Sia Patro. Kaj tio apartenas al la dia volo.

Jen Jesuo tuj sin prezentas kiel tiu kiu ne sekvas la patrojn de Izraelo, sed Li sekvas la Patron. Tiu estas la novaĵo kiun alportas Jesuo. “Sed ili”, notas la evangeliisto, “ne komprenis la diron, kiun li parolis al ili”. Kaj en la koro de la patrino reelmergiĝas tiu stranga beno kiu transformiĝis en glaciplena vorto, kiam Simeono diris al ŝi: “Glavo trapasos vian tutan vivon”.

En la Sankta Biblio la glavo estas la bildo de la vorto de Dio, glavo kiu iras ĝis la disdivido de la homo. Nu, en la patrino de Jesuo iu glavo komencas reelmergiĝi kaj disdividi ŝian ekzistadon. Kaj la evangeliisto finas la epizodon dirante ke se ĉiuj estas mirigitaj la samo okazas al lia patrino, sed, “lia patrino konservis ĉiujn tiujn dirojn en sia koro”.

Fronte al la novaĵo, ne komprenita novaĵo, fronte al tiu Jesuo kiu ne sekvas la patrojn, sed sin montras laŭ tute malsimila maniero, ĉiuj miregas, eĉ Maria, sed Maria ne rifuzas la novaĵon; Maria estas la virino kiu akceptas la novaĵon eĉ kiam ŝi ŝajnas ne ĝin kompreni, kaj tio komencos en ŝi transformiĝan procedon kiu kondukos ŝin fariĝi de patrino de Jesuo ĝis disĉiplino de la Kristo.

Sed la irvojo estas ankoraŭ longa kaj dolorplena.